

marto 1969
62-a jaro
n-ro 760 (3)

esperanto

oficiala organo de
universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



**VINTRO
EN
FINNLANDO**

trafoliumante la sekvantajn paĝojn, ke preskaŭ la tuton de tiu ĉi marta numero de "Esperanto" ni dediĉas al la kongresa lando 1969. Al tiu granda plimulto da legantoj, kiuj ne ĉeestos la 54-an Universalan Kongreson, ni tamen ne pardonpetas: ĉar ni klopodis prezenti al vi la landon tia, kia ĝi estas, sen troigoj kaj sen ŝminkado, kaj samtempe tiel, ke ĝi kaptu la intereson eĉ de tiuj, kiuj neniam povas esperi viziton al Finnlando.

Ni tamen ne tute neglektas aferojn nefinnajn. Sur paĝoj 42-43 oni trovas koncizajn raportojn pri kelkaj el la ĉefaj okazaĵoj, kiuj koncernas nian movadon, dum ankaŭ ekde paĝo 57 kelkaj regulaj rubrikaj sukcesis trovi lokon. La aliaj – CED, recenzoj, leteroj de legantoj k.a. – reaperos en la aprila numero.

Cu estas permesite atentigi, ke tiu ĉi marta eldono vojaĝas al ĉiuj adresoj de legantoj 1968, sed ke jam la aprilan ricevos nur tiuj, kiuj pagis ĝustatempe ankaŭ por 1969? Via kotizo (prefere frua!) helpas al ni altigi la nivelon de "Esperanto" kaj fari ĝin pli aboninda.

La ilustraĵojn de tiu ĉi numero ni dankas grandparte al la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, Helsinki, sed ankaŭ al "Helsingin Sanomat" (p. 47), "Welt auf Reisen" (p. 56) kaj la Finna Vojaĝasocio (p. 50, 55).

Enhavo

- 41 Alloga kongreso en alloga lando: la 54a UK en Helsinki
- 42 Nova landa asocio
- 42 Esperanto penetras sovetajn lernejojn
- 43 Rekomendo al PTT
- 43 Okazos kongreso pri skribsistemoj
- 43 Granda amiko de UEA (nekrologoj)
- 44 Vintro en Finnlando (Sadler)
- 54 Kion parolas finnoj (Setälä)
- 56 Hejma banejo (Aho/Mäntyjärvi)
- 57 La juna vivo: La junularo alvokas
- 58 Oficiala informilo n-ro 421
- 59 Esperanto en radio
- 60 Anoncetoj

La kovrilo

En la monde laŭdataj finnaj art-objektoj – kiel cetero ankaŭ en la finna modo – ofte speguliĝas la fizika karaktero de tiu neordinara lando. Ĉi tiuj vitro-vazoj, karakterize finna produkto, jam ne estas artefaritaĵo, sed kvazaŭ reprezentaĵo, en la hejmo, de la libera naturo. En la naturaj formoj de lagoj, la kurbigoj de neĝamasoj kaj ties ombroj, la linioj de betulaj branĉoj ŝarĝitaj de vintro, finnaj artistoj trovas inspiron senfine varian.

(Fotoj: Eksterlanda Ministerio/Finn-Flare)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Redaktoro: D-ro V. Sadler.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 18,75 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 25,— gld.). Unuopa ekzemplero: 1,— gld.

Banko: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefona: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano por diskonigo de la agado de UEA: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo. Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

Estrarano pri turismo: S-ro M. Jaumotte, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

Estrarano pri lernejoj: S-ro J. Toczyski, skr. p. 57, Gdańsk 1, Polujo.

Estrarano pri financoj: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj: D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

ALLOGA KONGRESO EN ALLOGA LANDO

Angulo de la vasta kongreseja komplekso Dipoli-Otaniemi apud Helsinko



Jam pli ol mil personoj aliĝis al la 54a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Helsinko de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto. Laŭ la plej nova statistiko la plej granda grupo (atendeble) estas tiu de la kongresa lando mem. Sekvas ĝin Svedujo, ĝia intima najbaro; Francujo, malgraŭ la lastatem-paj financaj limigoj por francaj civitanoj; Nederlando, Britujo kaj Germanujo. Ankaŭ Japanujo kontribuas ne malgrandan grupon: 29 personoj ĝis la momento de redakto.

Kie la Kongreso loĝigos tiom da personoj? Entute litoj estas rezervitaj por pli ol 1800 kongresanoj, el kiuj la duono troviĝas en diverskategoriaj hoteloj de la ĉefurbo mem, dum pli ol 900 troviĝas en la komplekso Otaniemi, tuj apud la Kongresejo mem. Por bone komprenigi la situon de Hotelo Otaniemi, necesas unue priskribi la Kongresajn ejojn.

La situo de la kongresejoj

La Universala Kongreso okazos ĉi-jare — se ni flankenlasas momente la Inaŭguron kaj la Teatrajn Vesperojn, — ne en Helsinko mem, sed en tre bela kvartalo trans la fjordo okcidente. Tie, unu apud alia, troviĝas la konata ĝardenurbo Tapiola kaj la kvartalo Otaniemi. En tiu lasta kvartalo, do, okazos la granda plimulto da kongres-aranĝoj.

Helsinko mem, sur la suda marbordo de Finnlando, staras sur duoninsulo ĉirkaŭita de insuloj diversgrandaj. Por atingi Otaniemi, oni povas aŭ ĉirkaŭveturi la fjordon aŭ veturi rekte per pontoj, kiuj interligas la insulojn. Survoje oni trapasas la ĉefan insulon, Lauttasaari, sur kiu situas cetere unu el la du kampadejoj de la urbo. Aŭtobuse la veturo de la centro de Helsinko (proksime de la stacidomo) ĝis la pordoj mem de la kongresa komplekso daŭras malpli ol 20 minutojn.

Per la vortoj "kongresa komplekso" ni alu-

das tri ĉefajn partojn, triangule lokigitajn je distanco de nur 200-400 metroj unu de la aliaj: la hotelo Otaniemi, kun pluraj dise starantaj sekcioj po pluraj etaĝoj, la kongresa/studenta konstruaĵo Dipoli, kun diversaj kunvenejoj, restoracioj, teatreto kaj ripozejoj, kaj trie la Teknika Altlernejo, en kiu pluraj prelegejoj estos je dispono de la Kongreso.

La apuda bildo donas nur fragmentan ideon pri la beleco de la konstruaĵo Dipoli, en kiu naturaj lignoj kaj rokoj interplektiĝas kun modernaj konstrumaterialoj por krei tuton, kiu ŝajnas integra kaj natura parto de la monteto, sur kiu ĝi staras. La ĉirkaŭaĵo proponas ravajn promenojn tra pinarbaroj, strandon kaj saŭndomon.

La programo konkretiĝas

La kongresa programo granda-traĵe jam formiĝis. El la kulturaj aranĝoj, la Finna Vespero, kun popolaj dancoj, popolkantoj en Esperanto kaj aliaj folklorajoj, kaj la Internacia Arta Vespero jam fariĝis tradiciaj programeroj. Nova estas la Debata Vespero, kiu celos doni en la kadro de formala debato (kun enkondukaj kaj konkludaj paroladoj kaj fina voĉdono) eblecon al ĉiu kongresano esprimi sian vidpunkton pri aktuala diskuttemo. Ĉi-jare, por la unuafoja Debata Vespero, la temo estos: "Esperanto — ĉu ideologia aŭ praktika instrumento?" (Por la praktika vidpunkto parolos s-ro E. L. M. Wensing.)

Alia diskutiga temo estas tiu de la Unua Generala Kunveno de UEA: "La lingva problemo en la kadro de la monda politiko kaj la taskoj kaj idea bazo de la Esperanto-organizaĵoj".

Krom laborkunsidoj kaj kulturaj aranĝoj, ankaŭ pli da sociaj, interkonatigaj programeroj estas planataj por Helsinko. Laŭ ĉiuj aŭguroj, la 54a estos alloga Kongreso en alloga ĉirkaŭaĵo!

NOVA LANDA ASOCIO

La 27-an de januaro 1969 okazis en Prago solena transdono de la registrita kaj subskribita statuto de nova landa asocio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La transdono signas klaran paŝon survoje al starigo de ĉeĥa kaj slovaka Esperanta-organizaĵoj konformaj al la nuna politika strukturo de Ĉeĥoslovakujo.

Pli vastaj perspektivoj

Jam de 1958 ekzistis landa instanco Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (ĈSEK), kaj en 1965 ĝi ricevis novan organizan formon kiel sekcio de la Kleriga Instituto en Prago sed ĝia ago-sfero restis ĉiam relative limigita, precipe se oni komparas kun Esperanto-asocioj en la najbaraj landoj. La nova statuto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kiun aprobis kaj registris la ministrejo de internaj aferoj, donas pli vastajn perspektivojn.

Sekvos ankaŭ slovaka asocio

Post nelonge sekvos la fondo de Asocio de Esperantistoj en Slovakio. Kune kun ĈEA ĝi formos tutŝtatan Ĉeĥoslovakon Esperanto-Federacion. Tiel respeguliĝos ankaŭ en la Esperanto-movado la lastatempa politika ŝanĝo, kiu el la antaŭa unueca ŝtato Ĉeĥoslovakujo faris federacion.

La novaj organizaĵoj estos memstaraj kaj ne dependos de la respektivaj Klerigaj Institutoj en Prago kaj Bratislava. Kvankam jam unu el la statutoj estas akceptita, la efektiva dato de ekfunkcio laŭ la novaj statutoj estas ligita al la dato de la respektivaj fondkongresoj.



S-ro Jaroslav Mařík subskribas, la 27-an de januaro, la akcepton de la nova statuto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

ESPERANTO PENETRAS SOVETAJN LERNEJOJN

En la soveta respubliko Litovujo instruas la Internacian Lingvon jam 19 lernejoj en la lernoĵaro 1968-69, laŭ oficiala programo nove eldonita de la Ministrejo pri Klerigo. La nombro 19 ne estas granda, certe, sed ĝian signifon elstarigas la fakto, ke antaŭ la publikigo de la nova programo EĈ NE UNU lernejo en la tuta Soveta Unio instruis oficiale Esperanton.

Mankas instruistoj

La sukceso jam povus esti multe pli granda, sed, rezulte de la multjara bojkoto de Esperanto en la soveta kleriga sistemo, momente ankoraŭ tre mankas personoj kvalifikitaj por instrui la lingvon en lernejoj.

Detaloj pri la nova instru-programo aperas en litovlingva broŝuro 40-paĝa, distribuita en 3 000 ekzempleroj. Ĝi portas la titolon (litove): "Programo de fakultativa instruado de fremdaj

lingvoj kaj Esperanto".* Ok paĝoj estas dediĉitaj al Esperanto.

La lingvo plej facila

En la enkondukaj klarigoj la Ministrejo prezentas Esperanton kiel „la lingvon plej rapide lerneblan el ĉiuj lingvoj de la mondo” kaj emfazas, ke ĝi donas bonan bazon por posta lernado de aliaj lingvoj. Ĝi difinas 52-lecionan programon po 1½ horoj semajne. La kurson rajtas partopreni la klasoj 7a ĝis 11a.

En la nuna momento, kiam UEA preparas novajn gravajn paŝojn por antaŭenigo de Esperanto en la lernejoj, la novaĵo pri tiu sukceso en Soveta Unio ŝajnas aparte favora aŭguro.

* Uŝsienio kalbu ir Esperanto kalbos fakultatyviniu užsiemimu; Programos.

Rekomendo al PTT

Nova ministeria rekomendo pri la lernado de la Internacia Lingvo en Bulgarujo rezultis el la vigliganta agado de IPTEA, la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio. La cirkulero, datita la 13-an de novembro 1963 kaj numerita S-7-1023, devenas de la ministerio de komunikado kaj estas direktita al la ĉefoj de la distriktaĵaj direkciaj de komunikado kaj specialigitaj PTT- kaj radio-entreprenejoj.

Signifo kaj graveco de Esperanto

En la nomo de la estraro de la koncerna ministerio, la ministro pri komunikado, s-ro Stojan Tonĉev, aludas al la propono pri organizo de Esperanto-kursoj, kiun direktis al ĝi IPTEA. Li tiam "rekomends al la lernejoj kaj al entreprenejoj diskonigi tion al la lernantoj, laboristoj kaj oficistoj, klarigante la signifon kaj la gravecon de la Internacia Lingvo Esperanto, kaj helpi la Esperanto-societojn por organizado de Esperanto-kursoj, laŭeble disponigante al ili kabinetojn, lernilojn, lektorojn k.a."

Ŝtupo al novaj atingoj?

Estas klare, ke tiu ĉi nova decido malfermas vastajn eblecojn. Kune kun la instrukcio de la ministro pri klerigo (1963) pri studrondoj en mezgradaj lernejoj, ĝi formas solidan bazon por estontaj ankoraŭ pli signifaj atingoj.

Okazos kongreso pri skribsistemoj

La ideo pri monda kongreso por unuigo de la skribado de sciencaj signoj, kiu samtempe okupiĝus pri la demando de unueca skribsistemo por la tuta mondo, jam ricevis konkretan formon. La projekto, kiun ni raportis unue en la januara "Esperanto" (p. 5: "Nova iniciato pri alfabetoj"), efektiviĝos sub patroneco de la Sekretariejo pri Kulturo, Sporto kaj Turismo de la ŝtato São Paulo, Brazilo. Laŭ raportoj en la brazila gazetaro, la kongreso okazos, ne en Libano, kiel la iniciatintoj unue proponis, sed en São Paulo mem, de la 21a ĝis la 28a de septembro 1969.

Jam formiĝis organiza komitato, en kiun eniris ses profesoroj, du ministroj kaj unu ambasadoro.

Premioj: \$3000 kaj \$1000

En ligo kun la kongreso la Universitato de São Paulo proponas du premiojn de respektive \$3000 kaj \$1000 usonaj por la plej bonaj verkoj pri temo rilatanta al alfabetoj kaj skribsistemoj.

Kvankam la kompetenteco kaj programo de la kongreso en São Paulo ankoraŭ ne estas tute klaraj, ĝi sendube meritas nian pluan atenton.

Granda amiko de UEA



Ges-roj Yelland

NEKROLOGOJ

ERNEST EDWARD YELLAND (1880-1969)

Post longa malsano forpasis la 28-an de januaro, 89-jara, s-ro E. E. Yelland en Aspremont, Francujo. Naskita en Britujo, li lernis Esperanton en la komenco de la jarcento kaj dediĉis la tutan vivon al agado por la lingvo. Li estis senlaca kursgvidanto kaj preleganto, i.a. ankaŭ en Soveta Unio kaj Balkano, tra kiuj li vojaĝis en 1928-30 kun sia rusa edzino. Li ĉeestis preskaŭ ĉiujn Universalajn Kongresojn kaj estis ĝis la morto delegito de UEA.

En 1931 li aĉetis domon por UEA, kiun li dum pluraj jaroj gvidis kiel Internacian Hejmon Esperantistan. Ĝia vendo grave kontribuis al la monrimedoj de UEA, kiel ankaŭ la nova granda donaco, pri kiu informis la novembro "Esperanto" pasintjara.

Ĉe la enterigo en Aspremont, la 30-an de januaro, parolis en la nomo de UEA s-ino G. Coleau, delegito en Nice. Le Asocio perdis unu el siaj plej grandaj amikoj.

ISMAEL GOMES BRAGA (1891-1969)

Mortis en Rio de Janeiro la 18-an de januaro s-ro I. Gomes Braga, pioniro el 1907, vic-prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo de post 1946. Li estis konata ĉefe kiel tradukanto kaj verkisto (i.a. la reeldonita "Veterano?") kaj pro sia vigla informa laboro en spiritismaj kaj aliaj medioj. Li estis fak-delegito de UEA. Liaj kurso-libroj kaj vortaroj restas inter la plej ŝatataj de portugallingvanoj.

LUIS DE AZEREDO COUTINHO

En Belo Horizonte, Brazilo, mortis la 22-an de decembro d-ro Luis de Azeredo Coutinho iama komitatano de UEA, delegito kaj fakdelegito pri medicino.

ATTILIO VAONA (1880-1969)

Forpasis advokato Attilio Vaono, 88-jara, en Romo le 9-an de januaro. En 1922-23 li estis prezidanto de Itala Esperanto-Federacio. En la lastaj jaroj li estis la sola vivanta italo, kiu persone renkontiĝis kun L. L. Zamenhof.

REJO PEASE

Mortis la 13-an de januaro, 73-jara, malnova membro de UEA s-ro R. Pease en Jersey City, Usono, iama delegito kaj ĝis la morto fakdelegito.

VINTRO EN FINN LANDO

Lando de rus-ortodoksaj preĝejoj sen preĝantoj, lando, kies loĝantaro estas nur la duono de tiu de Londono, lando, kie la hidroelektristoj daŭre konstruas novajn lagojn, kvazaŭ ne jam sufiĉus la 60 000 naturaj lagoj, lando neformala, kie ministerio havas manskribitan nomtabulon, lando supermoderna, kie oni dancas laŭ bosanovoj de antaŭ kvin jaroj, lando... Finnlando!

En januaro vizitis Finnlandon laŭ invito de la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj la redaktoro de "Esperanto". Sur la sekvantaj paĝoj la redaktoron intervjuas – ĉar memevidente redaktoro ne povas intervjui sin mem – la direktoro de la Centra Oficejo.

Pri Finnlando ekzistas multaj miskomprenoj eksterlande. Miskomprenoj pri ĝia politika pozicio. Miskomprenoj pri ĝia vivnivelo. Sed eble plej miskomprenata estas la finnlanda klimato. Norda lando? Jes, sed ankaŭ la lando de noktomeza suno. Malvarma? Jes, kiam neĝo kaj glacio tegas la landon de decembro ĝis marto, sed en printempo sesdek mil lagoj malfermas siajn blujajn okulojn, kaj en somero ili respegulas varman taglumon dum tri kvaronoj de la tagnokto aŭ pli, laŭ la latitudo.

Dekstre: En la moderna ĝardenurbo Tapiola, kiu situas tuj proksime de la kongreseja kvartalo Otaniemi, okazos paralele kun la Universala Kongreso la 11a Internacia Infana Kongreseto, ekskluzive por infanoj, kiuj flue parolas Esperanton.



Sinjoro redaktoro — ĵus vi revenis el unu-semajna vizito al la ĉi-jara kongreslando. Ĉu en tiel mallonga tempo oni entute povas formi impreson pri tiel vasta lando?

Efektive, nura semajno estas nenio. Se oni dekalkulas minimuman, sed tamen realan tempon por dormado, kaj amason da tempo por intervjuoj kaj interparoloj, paroladetoj en Esperanto-kluboj kaj mi ne scias kio ankoraŭ, ne restas tro da horoj por kapti impresojn, por jam ne paroli pri kohera verkado.

Pri kiaj intervjuoj temas?

Ja, min oni intervjuis — pri Esperanto, pri la Kongreso en Helsinko. Kurioze, ke, kvankam finna ministerio invitis min kiel ĵurnaliston por raporti pri Finnlando, tiu sama instanco tuj aranĝis okupi min per intervjuoj por la finna gazeto. Fine mi komencis demandi min, ĉu Finnlando estas vere la lando de lagoj kaj arbaroj, aŭ unuavice de ĵurnalistoj. Sed la efiko estis sendube bona el vidpunkto de la Kongreso: aperis minimume 23 artikoloj kaj 19 malpli grandaj informoj en diversaj gazetoj finnaj kaj svedlingvaj, inter ili la plej gravaj de la lando. Okazis ankaŭ du televid-intervjuoj. La sinteno de la raportistoj al la Internacia Lingvo ŝajnas tute pozitiva. Mi ne povas ne citi la lastan demandon, kiun oni direktis al mi en televido: "Kial Esperanto sukcesis, dum aliaj projektoj de internacia lingvo malaperis?" Sufiĉe pozitiva, ĉu ne?

Kiel vi vojaĝis?

Bone. Finnair uzas maŝinojn Caravelle sur la internaciaj linioj. La flugo-tempo el Amsterdamo estas ĉirkaŭ 2 horoj kaj 20 minutoj. Helsinko havas multajn ligojn aerajn kaj marajn (ankaŭ aŭtopramajn), kaj oni certe ne bezonas timi malfacilaĵojn aŭ malkomforton. Mi alvenis al tute blanka mondo — ĉar neĝo neniam mankas en januaro — kaj al neatendite modesta aerhaveno. Oni tuj klarigis, ke nova, impona estas konstruata. Baldaŭ do Finnlando havos pardonon tiel modernan, kiel decas al lando moderna kaj bonstata.

La proksimeco al Soveta Unio estas tuj konstatebla: la plurlingvaj surskriboj ĉe la aerhaveno inkluzivas la rusan. Supozeble ili servas al la dungitoj de Aeroflot, ĉar nur malmultaj turistoj sovetaĵ vizitas la landon, malgraŭ unu eminenta ekzemplo lastatempa...

Entute la moderna turismo iom neglektas Finnlandon. Ĝi havas grandajn allogaĵojn, kaj la nombro de turistoj devus kreski multe pli rapide. Oni informis min, ke pasintjare alvenis 1,6 milionoj; sed ili ne estis centprocente aŭtentikaj turistoj: granda parto estas ĉiujare svedoj, kiuj vizitas parencojn en Finnlando. (La kulturaĵ kaj historiaj ligoj kun Svedujo estas forte sentebaj.)

Mi demandis al Matti Tuovinen, simpatia fakestro de la Eksterlanda Ministerio. "La ĉefa problemoj por la turisma propagando," li

respondis, "estas la mallonga somero. Nuntempe ni pripensas, ĉu speciale propagandi la vintran turismon en Laponujo." Je tio mi ne povis ne esprimi mian nekredeman miron, ĉar vintre en Laponujo ja entute ne tagiĝas: la suno restas 24 horojn sub la horizonto. Milda rideto apenaŭ tagiĝis sur la vizaĝo de Tuovinen: "Ni fakte pensis pri geedziĝ-vojaĝoj", li klarigis.

Pri la mallongeco de la somero provizore ŝajnas nenio farebla, ĝis iu solva eltrovo de la sciencistoj. Sed oni ne miskomprenu: tre malmultaj turistoj disponas libertempon tiel longan, kiel la finna somero! Krome, kvankam nelonga, ĝi estas des pli intensa, ĉar kiel konate, la somertagoj de tiel norda lando estas tre longaj. Anoj de la 54-a Universala Kongreso spertos en Helsinko ĉirkaŭ 17 horojn tage da plena taglumo, kun temperaturo, kiu atingas 21 ° C. Ne hazarde, ke ĝuste je tiu sama temperaturo oni kutime varmigas la domojn vintre, ĉar ĝi estas la plej agrabla temperaturo por normala vivmaniero.

Unu ebla kaŭzo de la relativa nemulteco de turistoj estas la postrestado de la publika imago malantaŭ la moderna evoluo. Same kiel oni populare ankoraŭ supozas Nederlando lando de ventmueliloj kaj Japanujon lando de geĵŝoj, tiel same ekzistas miskoncepco pri Finnlando kiel lando arbara, iom kruda kaj primitiva. Nenio povus esti pli erara. Kiel la 13-a plej riĉa lando de la mondo (laŭ UN-statistikoj) ĝi prezentas al turistoj ĉiun komforton kaj faciligon, kiun ili kutimas atendi en la plej evoluintaj landoj. Finnaj hoteloj, ekzemple, laŭ sia nivelo tute ne diferencigas de hoteloj en aliaj bonstataj eŭropaj landoj. (Ke tamen ne mankas al ili iom aparta etoso kaj karaktero, tio estas alia afero, kaj pro tio ja oni vojaĝas entute.)

Ankaŭ la enlanda transporto estas oportuna kaj tre komforta. Tio estas grava, ĉar la distanco estas tre longaj. Dekoble pli vasta ol Nederlando, Finnlando estas longa 1160 kilometrojn kaj larĝa 540 km. Sed, denove kompare kun Nederlando, la loĝantaro estas nur unu triono. Signifas, ke la lando estas tre maldense loĝata. La fervoja reto konsistas el nombro da ĉeflinioj praktike sen branĉoj. Etajn loĝlokojn servas aŭtobusoj aŭ aliaj transportiloj. Tiu limigo de la servo al la ĉefaj linioj ebligis al la fervojo atingi tre altan nivelon. Mi havis la okazon konatiĝi kun ĝi en ĝia plej malfacila sezono, kiam intensa frosto kaj drivanta neĝo senpaŭze okupas tutan armeon da fervojistoj. Ĝi funkciis perfekte. En naturkondiĉoj, kiuj tuj paneigus la tutan fervojan sistemon de mia propra lando (Britujo), la finnlandaj lokomotivoj bonhumore sirenumas sian vojon tra la neĝo sen ia ajn hezito.

Veturi fervoje estas unu el la ĝuoj, kiujn proponas la finna vintro (kaj sendube ankaŭ la somero!). En kiom da aliaj landoj oni trovas klimatizitajn vagonojn kun — en la dua klaso — dike remburitaj brakseĝoj unuope klineblaj? La senton de ĝenerala komforto pliigas la aparta konstruo de la vagonoj, kun alta teg-



Veturi estas plezuro

mento kaj sekve amaso da spaco interne. Duoblaj vitroj efike izolas la kupeojn de la ekstera mondo.

Dum mi malstreĉiĝis en la vojaĝo norden de Tampere al Jyväskylä, knabineto somerece vestita servis kafon kaj glaciaĵojn; ekstere preterglitis vagonoj kurtenitaj de glaci-ponardoj foje unu metron longaj, aŭ jen ŝarĝvagonoj da arbotrunkoj el la nordo, tegitaj de neĝo.

La du plej gravaj industrioj de Finnlando estas la ligna (kompreneble) kaj la metala. Tiu lasta vigle disvolviĝis post la dua monda milito dank'al la neceso pagi militkompenson al Soveta Unio en la formo de metalproduktoj.


La ŝanĝo speguliga en la konstruo de fervojvagonoj: la pli malnovaj estas preskaŭ tute el ligno muntitaj, dum la novaj montras pli da metalaj surfacoj, kvankam ankoraŭ la ligno estas abunde ekspluatata.

Fervoja veturo povas prezenti, kalejdoskope, multajn facetojn de la nacia vivo. Jen el arbara vojeto aperas ĉevalo kun sledo; jen dommas-trino trenas hejmen polietilenan sledeton hele ruĝan, ŝarĝitan per bebo kaj jusaj aĉetaĵoj; jen plenaĝulo glitveturas al sia laborejo per praktika aparato konsistanta el biciklo-speca framo sur paro da skioj. Ne, li ne mem konstruis ĝin; tia veturilo, oni klarigis al mi, estas tute normale aĉetebla.

Sur kampara perono aperas neregula kolono da junaj soldatoj (7-12-monata militservo estas deviga) en grizaj uniformoj kaj samkoloraj peltoĉapoj kun ŝirmoklapoj je kvar flankoj. Ve al tiu, kiu ion lasas fali, ĉar, baraktante sub monstra tornistro, li riskas mem ne plu povi leviĝi... La pejzaĝo ŝanĝiĝas, kaj la soldatoj transformiĝas je junaj piceoj, klinitaj sub peza tornistro da neĝo kaj etendantaj la du stumpajn brakojn por ekvilibro.

Orelfrapa por alilandano estas la biblioteka silento, kiu regas en la kupeoj de Valtionrautatiet (Ŝtataj Fervojoj). Mi komencis pridubi mian ĝistiaman supozon, ke la silenta vagonaro en la unua sceno de "La Silento" estas truko de Ingmar Bergman. Ĉu eble nur ĉiutaga skandinavia fenomeno? Kontribuas al ĝi certe, la sonizolaj duoblaj vitroj, sed ŝajnas krome, ke la

Ligno konsistigas la ĉefan naturan riĉaĵon de Finnlando. 70% el ĉiuj eksportaĵoj estas ligno-produktoj. Laŭ la planistoj, post 20-30 jaroj devus esti jam 30% pli da ligno disponebla por eksporto, ol hodiaŭ – sed oni estas maltrankvilaj pri la iom-post-ioma forkonsumado de la arbaroj, kiuj kovras la pli grandan parton de la lando. Lagoj kaj riveroj – 10% de la tuta surfaco de Finnlando – ebligas malmultekostan transporton de la ligno.



**En januaro aperas
 interesa fenomeno ĉe
 la haveno de la ĉefurbo.
 Tie vice starantaj aŭtoj enhavas
 po du personoj. La motivo? Pro la
 malvarma mara vento la homa spirado
 tuj formas netravideblan kurtenon da
 frosto-steloj sur la aŭto-fenestroj. Ju
 pli forta la spirado, des pli densa la kurteno,
 sekve des pli forta la spirado . . . cirklo fermita!**

finlandanoj alte respektas la rajton pace mediti aŭ private konversacii en vagonaro. Oni flustras unu al alia kvazaŭ dum prediko, kaj eĉ la gazetvendisto ne kuraĝis propagandi siajn varojn alie, ol per muta promenado de unu vagono al alia.

Kiam fine mi povis konvinki min, ke temas nur pri hazarda silentemo de la kunvojaĝantoj, kaj povis retrovi sufiĉe da kuraĝo por kondukti "normale", mi ekfajfis simplan melodion — nur tiel, por mi mem, inter la dentoj. Sed tuj turniĝis malaprobaj kapoj, kaj ne restis al mi alia ebleco, ol konformiĝi al la pruvitaj normoj.

Pri la fervojo mi jam multe rakontis, sed ankaŭ en Finnlando la temo estas tre diskutata. La registaro, nome, trovas sin en dilemo, ĉu elektrigi la tutan sistemon, kiel iuj fakuloj proponas, aŭ konservi la nunajn tre potencajn dizel-lokomotivojn.

Alia tre aktuala diskutemo estas la buter-problemo. Same kiel kelkaj aliaj landoj, Finnlando nuntempe super-produktas buteron, tiom, ke ĝi ne plu scias, kion fari per la grandegaj akumulaĵoj. (La situacion ne faciligas la enlanda prezo de la butero: po 10 fmk. por unu kilo — egalvaloro de 8,40 guldenoj). La samo validas pri lakto-produktado. Kelkaj larĝvidaj personoj jam proponis solvi du demandojn per sola rimedo: funkciigi la fervojon per buterbrulaĵo. La superflua lakto servus eventuale al la multaj vapor-lokomotivoj ankoraŭ uzataj.

Kompreneble oni povus ankaŭ tute malkonstrui la fervojon, por tiel eviti la dilemon. Restus bonega reto da enlandaj fluglinioj kaj unuaranga long-vetura aŭtobusa servo. Estas vero, ke por enlandaj flugoj servas piŝtomotoraj Convair, sed la stevardinoj unuavide ne postrestas laŭ sia beleco tiujn de la internaciaj linioj — kaj tio ja estas la ĉefa afero. Per aŭtobuso oni povas atingi sian celon apenaŭ malpli rapide, ol per trajno, kaj nur iom malpli komforte. Finnair reklamas siajn

enlandajn servojn kiel la plej malmultekostajn de Eŭropo. Ekzemplo: Helsinki-Turku, unu-direkte tra 167 km = 24 fmk. (ĉ. 20 gld.). Kontraŭargumento por multaj turistoj, verŝajne, estas ilia senalkoholeco.

Ĉu ĝenerale oni malpermesas alkoholaĵojn?

Ne temas pri vera malpermeso, ŝajne, sed la turisto ofte trovas, ke en difinita restoracio aŭ en difinita horo li ne povas ricevi. Entute regas kontraŭalkohola sinteno ĉe granda parto de la popolo. Mi legis, ke en 1970 la Finnlanda Fervojista Abstinec-Asocio organizos junularan semajnon por abstinaj fervojistaj esperantistoj sub la aĝo de 35 jaroj. Abstina fervojista esperantisto malpli ol 35-jara ne estas en la sama kategorio kiel blonda mahometana abelbredisto, kiel mi iam naive supozis. Male, ĝi estas tute normala kaj tre finna estaĵo.

Tiu ĉi kontraŭalkoholismo havis la bedaŭrindan sekvon, ke finnlandaj fabrikoj produktadas ne nur relative malfortan bieron (kio estas pardonebla aŭ aplaŭdinda, depende de la vidpunkto), sed ankaŭ ian t.n. "duonbieron" kaj eĉ tute senalkoholan kvazaŭbieron, kiu por mia gusto estas same alloga kiel plasta fromaĝo. (Cetere, finnlandaj fabrikoj sukcesis produkti ankaŭ preskaŭ nebruligeblan cigaredon — sed tio estas alia historio.)

Al eks-fervojistoj pli ol 35-jaraj mi volonte rekomendas tamen la finnan specialaĵon "Polar", trinkaĵon preparitan el oksikokoj, kies dolĉe-pikan guston ĝi konservas.

Kurioze, en Finnlando ne mankas ebruloj. Dum unu mallonga semajno alparolis min tri ebruloj. Kvara viktimo estis maljuna kaj malbela virino en aŭtobuso; ŝia ĝissata ebriceo igis ŝin sufiĉe parolema, sed siajn vortojn ŝi direktis jen, laŭtvoĉe, al la tuta mondo, jen al Dio, al kiu ŝi dankis, ke ŝi "ankoraŭ aspektas 20-jara, kvankam jam pli ol 60-jara". Al mi — kontraste kun la tri viroj ĵus menciitaj — ŝi absolute ne volis paroli. Male, ŝi plendis

Por sinjorinoj kaj pastoroj kravato ne estas deviga

al la aliaj pasaĝeroj, ke mi parolas ruse (fakte: Esperante). Tiel la kontraŭrusa sento de iu pli aĝa generacio (en la periodo 1939-1944 Finnlando dufoje militis kontraŭ Soveta Unio) kiel ankaŭ la malalta rezisto de finnoj kontraŭ alkoholo resumigis en jena diraĵo: Se ruse drinkas, li fariĝas dormema; se maljuna finno drinkas, li prenas ŝtonon kaj diras: "He, diabla ruse, mi mortigos vin!".

Ĉu oni bone manĝas en Finnlando?

Generale: jes. Plej elstaraj, laŭ mia gusto, estas fiŝoj: salmo, perko, ezoko k.s., kiujn oni scias tre delikate prepari. Tute apartaj estas t.n. "fiŝo-kukoj" — fakte grandaj pasteĉoj, ekzemple el salmo, rizo k.a. ingrediencoj. Unika (por ne uzi pli fortan esprimon) estas la viando de boaco. Unua-morde ĝi allogas per sia strangeco, sed, almenaŭ por mi, tiu unua fojo restos la lasta. Legomoj iom mankas, kaj la viandon oni ĝenerale servas nur kun terpomoj. La fromaĝoj estas tre delikataj kaj diversaj — certe inter la plej bonaj de Eŭropo.

Finoj kutimas manĝi nur dufoje tage, preterlasante matenmanĝon kaj vespermanĝante jam ĉirkaŭ la 17a aŭ 18a horo. Eble tial la hotelaj prezoj plejparte ne inkluzivas matenmanĝon. Tiel kompensas tion la skandinavia sistemo de iuj hoteloj, disponigi al la gastoj tutan tablon da manĝaĵoj, el kiuj ili povas ĝisate elekti je unu sama fiksita prezo.

La Granda Silento de la vagonaroj iagrade invadis ankaŭ la restoraciojn. Ĉe la matenmanĝo neniu provis alparoli min (manko de komuna lingvo?) kaj la sola muziko estis la kraketado de la bongusta seka pano (atentu la dentojn!). Sed silento ne estas deviga, mi opinias. Male, absolute deviga en restoracioj finnlandaj estas la portado de kravato. Por sinjorinoj oni faras escepton... kredeble ankaŭ por pastoroj kaj ĉinaj diplomatoj. Oni anekdotas pri distrita profesoro, kiu alvenis al manĝo senkravate sed sukcesis preteri la portadon per nodita barbo. En januara temperaturo de minus dek mi mem ne emis forgesi la kravaton.

En grandaj kongresoj, kiel tiuj de UEA, kun meze pli ol 2000 partoprenantoj, estas neeviteble, ke foje iu kongresano malsaniĝas. Ĉu la turistoj povas ricevi medicinan prizorgon senpage?

Se temas pri hospitala kuracado, ĝi ne estas tute senpage, sed tamen tre malmultekosta. Malsanulejoj estas trispecaj: ŝtataj, komunumaj kaj privataj. Ĉe la Eksterlanda Ministerio

En Finnlando mankas ministerio por kulturo, kaj oni ŝercas, ke ĝi estus senlabora, ĉar mankas kulturo. Pli ĝuste estus diri, ke la kulturo tiel floras sen ministerio, ke helpo burokrata povus nur ĝeni ĝian evoluon. Ĉu povas manki kulturo en lando tiel riĉa je teatroj, kun vigla moderna literaturo, kun arkitekturo monde renoma kaj utilisma arto tiel admirata en la meblo- kaj modo-butikoj de la mondaj ĉefurboj? Rigardu, maldekstre, la artan vitro-vazon de Oiva Toikka,

(kie ŝajne troviĝas la ŝtata arĥivo de anekdotoj) oni rakontis al mi pri lastatempa vizito de mongola diplomato, kiu alvojaĝis tro frue post operacio farita en Ulanbatoro. En Finnlando lia vundo remalfermiĝis, kaj necesis kuraci lin en malsanulejo. "Sed tie li kostis al ni nur 6-7 markojn tage; en Marski" (la plej luksa hotelo de Helsinki) "ni devus pagi al li ĉambron po 60-70 markojn tage." Mi decidis tuj forlasi la ĉefurbon, antaŭ ol la Ministerio decidus redukti la elspezojn kaj enhospitaligi ĉiujn siajn eksterlandajn gastojn.

Ĉu vi ne spertis lingvajn malfacilaĵojn?

Iom, kompreneble. Kvankam mi vojaĝis plejparte per helpo de Esperanto, foje necesis uzi alian lingvon, ekzemple en butikoj.

La turismo ne estas ankoraŭ granda industrio en Finnlando. Kiel mi jam diris, el la 1,6 milionoj da turistoj en 1968, granda parto estis svedoj — kaj ĝi estas unu el la du oficialaj lingvoj de Finnlando. El aliaj fremdaj lingvoj la germana ŝajnis al mi la plej utila en hoteloj, restoracioj kaj vendejoj. Sekvas ĝin la angla. Tamen nek unu nek la alia multe helpas ekster la grandaj hoteloj, ĉar la scio de fremdaj lingvoj estas ege supraĵa kaj neĝenerala. En tia situacio la plej konvena estas rekte kaj klare alparoli ĉiujn en la Internacia Lingvo, kaj tion mi faris. Kvankam la finna estas lingvo ne hind-eŭropa, ne mankas en ĝi internaciaj vortoj. Se vi petas poŝmarkon, la fraŭlino bone komprenos, ke vi deziras *postimerkki*. Same postkarto = *postikortti*. Rekoneblaj estas ankaŭ *hotelli*, *autobussi* k.a. Sed telefono = *puhelin*, lifto = *hissi*, biero = *olut!* Kaj stacidomo = *rautatieasema!*

Ne malofte koincidas vortoj finnaj kaj Esperantaj — laŭ formo, sed ne laŭ signifo! Ĉiu konas la finnan vilaĝon *Somero*, kie loĝas ĉefdelegito de UEA. La finna vorto *tie* ne estas korelativo, sed signifas vojon. *Valo* estas lumo, kaj *varma* estas certa. La listo estas tre longa. La plej proksima (kaj preskaŭ sola) lingva parenco de la finna estas la estona, kaj ankaŭ en ĝi abundas vortoj samformaj, sed kun aliaj, perfidaj senc-nuancoj. Jen kompleta finnlingva konversacio (feliĉe netipa!):

Kokoo kokoon koko koko!
Koko kokoko?
Koko koko!

(Traduko: Kolektu la tutan kolektaĵon! Ĉu la tutan kolektaĵon? La tutan kolektaĵon! — Utilaj frazoj por ĉiu turisto.) En taksioj mi konsilas montri skribitan adreson. En stacido-

moj la laŭtparoliloj estas, kompreneble, nekompreneblaj — sed ja, en kiu lingvo ili parolas klare? Problemeto por la vojaĝanto estas la dulingveco de la loknomoj. Oni ofte indikas tiel la svedan kiel ankaŭ la finnan nomon de la loko, sed la diferenco povas esti konfuze granda. Turku nomiĝas svede Åbo; Pietarsaari = Jakobstad; Tammisaari = Ekenäs; Kokkola = Gamlakarleby. Kiu tion konjektus?

Alia demando estas, ĉu tiu grandlitera vorto sur la perono estas la nomo de la urbeto, aŭ ĝi signifas nur "restoracion" aŭ "atendejon"? Prefere vojaĝu kun mapo!

Sed la lingvaj malfacilaĵoj neniel bezonas fortimigi. La enlandanoj estas tre helpemaj kaj frontas la problemon kun trankvila rideto.

Ili ja konas intime la lingvan problemon, ĉar ankaŭ enlande ĝi ludas sian rolon. Oficiale Finnlando estas dulingva lando, kvankam la svedlingvanoj estas nuntempe nur ĉ. 7% (el popolo 4,7-miliona). Kompare kun nacimallimultoj en aliaj landoj, la svedlingvanoj ĝuas grandajn rajtojn: lernejojn, universitaton, ĵurnalojn kaj televidon ili havas en la propra lingvo. La parlamento estas dulingva, kaj svedlingvaj paroladoj estas resume tradukataj en la finnan. Tamen, se temas pri grava debato, — tiel klarigis al mi ministeriano — ĉiuj elektas paroli finne, kun unu escepto.

Ankaŭ en la religio la lingvaj rajtoj estas leĝe gardataj. Se en iu loko troviĝas difinita minimuma nombro da svedlingvanoj, tiam devas okazi diservoj ankaŭ en tiu lingvo. Tiu devigo restas ankoraŭ dek jarojn post la dato, kiam la nombro de svedlingvanoj falas sub la minimumon. Tiel — ĉar ĝenerale, pro interdeziĝo kaj asimiliĝo, la nombro de svedlingvanoj falas — kelkloke okazas diservoj tute sen adorantoj. Nur je Kristnasko, kiam la finnlingvaj preĝejoj jam tute pleniĝis, la finnoj malfruiĝintaj pleniĝas ankaŭ la svedajn...

Pro ĝia oficiala pozicio apud la finna, la sveda lingvo estas deviga por ĉiuj lernejoj. Iuj lernejoj instruas krom la sveda ankaŭ la anglan kaj germanan, sed la plimulto instruas nur du fremdajn lingvojn. La rezultoj de tiuj studoj ne estas tre kontentigaj. La granda plimulto akiras nur malfortan scion de la sveda kaj nur pene povas kompreni la svedojn mem, ĉar ties akcento estas tute alia, ol la finnlanda. Efektive, kiam en televido oni prezentas la novaĵojn unue en unu lingvo kaj poste ripetas ĉion en la alia, fremdulo apenaŭ rimarkas la lingvo-ŝanĝon, ĉar la intonacio restas precize sama.

La scio de aliaj lingvoj estas ankoraŭ pli

fragmenta. Antaŭ nelonge okazis aviadil-akcidento ĉe Jyväskylä pro konfuzo inter la anglaj vortoj East kaj West. Pli amuze, hotel-afiŝo en unu el la ĉefaj hoteloj de la lando konsilis:

If you want to watch TV, ask the maid to open it, please! (Se vi volas rigardi televidon, bv. peti, ke la servistino malmuntu ĝin!).

Mi demandis al la ministro pri instruado, la 55-jara Johannes Virolainen, kiu jam la kvaran fojon en sia politika kariero okupis tiun oficon, kien kondukas la lingv-instrua politiko nuntempa. "Nian lingvon neniu scias" li respondis. "Mi mem aŭdis unufoje fremdan vorton, kiam mi estis jam dekjara. Necesas komenci la lingvo-instruadon kiel eble plej frue." Oni parolas en kelkaj rondoj pri akcepto de la angla lingvo kiel tut-skandinavia — kion opinias la ministro pri tio? "Nepre ne: por tiu celo ni devas havi la svedan."

Do — neniu ŝanĝo tiurilate, se restas la politiko de s-ro Virolainen. Lia ĉefa okupo en la nuna tempo estas nova leĝo ekvalidonta en 1970, kiu faros 9-jaran lernadon deviga por ĉiuj kaj antaŭvideble altigos la klercon precipe de kamparanaj infanoj.

Reformoj en la politiko de lingvo-instruado tamen ne estas maleblaj. Ŝtata komisiono eldonis antaŭ nelonge dikran raporton, kiu rekomendis, ke la infanoj ekzameniĝu unue en sia gepatra lingvo (finna aŭ sveda) kaj poste en unu el la "ĉefaj" lingvoj. Sekvus aliaj laŭelekto. En ligo kun tiu raporto, konsulta komisiono formita en la Universitato de Turku laŭ ministeria peto ĵus faris unuanime la proponon (laŭ iniciato de profesoro Pierre Naert), ke ankaŭ Esperanto estu elekta kiel unu objekto por la abiturienta ekzameno. Se tiu propono sukcesus, Esperanto fariĝus permesita instruobjekto en ĉiuj lernejoj de la lando.

Atendante kontentigan solvon de la lingva problemo, Finnlando elturniĝas, kiel ĝi povas. Akceptis min en sian kabineton la eminenta oceanografo Ilmo Hela, kiu kiel membro de la Plenuma Komitato de Unesko kaj precipe kiel prezidanto de ĝia komisiono pri financoj kaj administrado tre konscias la koston de la nuna plurlingva sistemo. Li mem emfazis la grandegan koston (\$ 850 000 por dujara periodo) de la enkonduko de la araba lingvo kiel plia laborlingvo de Unesko. "Jes, la unuan dujaran periodon konsentis pagi la arabaj ŝtatoj — sed poste?" Mi demandis, kiel staras la afero en la Plenuma Komitato mem de Unesko? "Nuntempe el 34 membroj, 17 parolas la anglan, 11 la francan, 5 la hispanan kaj unu la rusan (sed tiu perfekte parolas ankaŭ la anglan)." Kion opinias profesoro Hela pri la argumento de la japana delegito ĉe UN, ke, se japanoj devas paroli ĉe UN fremdan lingvon, tiam la

el la fabriko de Wärsilä-Nuutajärvi: freŝiga glaci-stango en varma somertago. Rigardu dekstre la robon desegnitajn de Vuokko Escolin-Nurmesniemi: inspirita de la puraj linioj kaj fortaj kontrastoj ĉie troveblaj en la konturoj de la finna pejzaĝo. Simpleco, natureco, fortikeco kaj pureco: jen la plej karakterizaj trajtoj de la finna utilisma arto-produktado.

Problemoj de sciencistoj

justeco postulus, ke ankaŭ angloj, rusoj, francoj kaj aliaj estu devigitaj paroli en iu fremda lingvo? "Certe, se estus akceptita tiu propono, tiam ĉiuj tuj akceptus prefere Esperanton!"

Kiel la lingva situacio sentiĝas ĉe la finnaj sciencistoj, mi demandis? "En la tridekaj jaroj oni publikigis la esplorojn ĉefe en la germana. Nuntempe oni prefere skribas en la angla — sed la angla lingvo ne taŭgas por internacia uzado. Ĝi estas tro malfacila. Fakte necesus scipovi legi ankaŭ en aliaj lingvoj, sed neniu scias la rusan, kaj nuntempe finnaj junuloj eĉ la germanan ne scias."

Kian solvon aŭ eliron la profesoro vidas? "Mi tute ne scias. Verdire, mi nun unufoje renkontas iun, kiu serioze pripensas tiajn problemojn."

Same en Helsinki mi konatiĝis kun unu persono, kiu vivtenas sin per la nekonateco de la finna lingvo. S-ro R. H. Milton, la sola nefinna membro de la Loka Kongresa Komitato de la 54a UK, venis Finnlandon el Londono en 1951. Profesie li tradukas, plejparte el la finna en la anglan, kaj plej ofte disertaciojn kaj artikolojn sciencajn kaj teknikajn. Por li la laboro abundas, sed la ĉefa problemo estas la manko de sciencaj kaj teknikaj vortaroj. Ja por tiel malgranda popolo ne povas ekzisti ĉiaj fakaj vortaroj, ĉar simple ne sufiĉus la aĉetantoj. Plej ofte, do, necesas rekte konsiligi ĉe la sciencistoj, kiel traduki la fakajn terminojn.

Jes, Finnlando elturniĝas, kiel ĝi povas, el la lingva dilemo. Ĉarma solvo aperas tra la tuta lando sur la pordoj de necesejoj. Anstataŭ la vortoj "sinjoroj" kaj "sinjorinoj" oni trovas figurojn pentritajn, ĉizitajn, eĉ skulptitajn: jen viron kaj virinon en nacia kostumo, jen simple pantalonon kaj jupon... sed ĉiam novan paron. Mi ne nombris aparte la necesejojn, kiujn mi vizitis en la kongresa lando 1969, sed mi ĵuras, ke ĉie oni sukcesis elpensi novan varianton de tiuj seks-disigaj "glifoj".

Kiel statas la Esperanto-movado?

Ĝi havas bonan perspektivon. Preskaŭ ĉiuj, kun kiuj mi parolis — ĵurnalistoj, politikistoj kaj aliaj — havas sufiĉe favoran sintenon al Esperanto. Kursoj facile allogas lernantojn. En Jyväskylä, ekzemple, ankoraŭ ne ekzistis Esperanto-societo antaŭ kvar jaroj. Hodiaŭ ĝi povas kunvenigi kvardekon da klubanoj kaj funkciigas kurson por same tiom da novaj lernantoj.

La centro de Helsinki havas tute propran stilon de arĥitekturo. Fasadoj blankaj alternas kun farbitaj: bluaj, flavaj, okraj, rozkoloraj... kvin-ses koloroj tiel karakterizaj, ke modernaj arĥitektoj kampanje ribelis kontraŭ ilia uzo! Sur placo antaŭ la urbodomo, super kiu leviĝas la impona protestanta katedralo, bunta amaso da bazaraj budoj proponas freŝajn fiŝojn, legomojn, preskaŭ ĉion manĝeblan.



Cetere, ankaŭ tiu urbo baldaŭ eldonos prospekton en Esperanto. (De la prospekto pri Helsinko kaj la broŝuro "Rigardu Finnlandon" tuj aperos dua eldono.) La Eksterlanda Ministerio jam eldonis same multe da literaturo en Esperanto, kiel en la rusa lingvo — po unu broŝuro!

Geneta ĉe nespertaj parolantoj estas la foja misprononco de konsonantoj, kiuj ne ekzistas en la finna lingvo. Mi unue staris tute perpleksa, kiam amiko memorigis min, ke mi devas "havi kimonon". Neniel mi povis elcerbumi, pro kio mi bezonus kimonon, ĝis mi divenis, ke la ekzotikan vestaĵon enkondukis la manko de la sono "g" en la nacia lingvo. Efektive, mi devis "havigi monon"! Sed mi rapide aldoni, ke tio estis la sola miskompreno, kiun mi spertis en Esperanto.

Kiel konate, la lingvo jam estas instruata en la Universitato de Helsinko. Instruas tie, krom magistro Setälä, la 30-jara sekretario de LKK, Veli Kolari, kiu havas la oficon de bibliotekisto ĉe la universitata biblioteko. Nova, perspektivo-dona sukceso estas, ke en la komenco de marto 1969 komenciĝas ankaŭ 12-semajna radiokurso de Esperanto, po 20 minutoj semajne. Ankaŭ tiun kurson gvidos s-ro Kolari. Unu el miaj televidaj intervjuoj devis servi ĝuste kiel reklamo por tiu radio-kurso.

Dum mi parolas pri televido: tre frapis min la juneco de preskaŭ ĉiuj en la televidaj studioj. Oni havas la impreson troviĝi inter studentoj en ia altlernejo por grafikaj artoj kaj elektroniko. La lasta novaĵo estas, ke la studia estraro aŝiŝis malpermeson kontraŭ kisado en la televideoj. Vidinte kelkajn el la tieaj sekretariinoj, mi komprenas, ke necesas iom da disciplino. Sed vi demandis pri la Esperantomovado, ĉu ne...?

Efektive, tamen ankaŭ finnaj junulinoj povas interesi niajn legantojn.

Tiurilate necesas iom da singardo. Dum ĵurnalista lunĉo aranĝita de la ministerio oni rakontis la skandalon pri unu pasintjara gasto — itala ĵurnalisto same tiel invitita je ŝtataj kostoj por konatiĝi kun Finnlando. Reveninte al sia lando li publikigis longan ilustritan, vere tre viglan raporton... pri la seksa vivo de la finnoj.

Kredeble tamen ne estas danĝere konstati, ke havas grandan ĉarmon la vintra kostumo de finnoj: plej ofte ronda pelta ĉapo, altaj ledaj botoj, kaj eĉ en januaro kuraĝa minijupo. Mi ne dubas, ke la kongressezona kostumo povas ĉarmi same.

La finnoj tamen sopiras liberiĝi de siaj virinoj. Tion mi devis konkludi el la fakto, ke ili tiel persvade klarigadis al mi, alilandano, ke finnoj ĉiam preferas fremdulojn!

Se entute nomi iujn ĝeneralajn karakterizojn de tiu popolo (ĉiam riska entreprenado!), mi dirus, ke la finnoj estas aparte ĝentilaj, akurataj kaj laboremaj, seriozaj kaj trankvilaj. Neniam aliloke mi trovis tian ĝentilecon, kiu demandas, ĉu mi preferas manĝi sola aŭ en kunesto kun aliaj. Ne povas esti mallaborema tia popolo, sur kies stratoj jam je la kvina kaj duono en vintra mateno estas vigla trafiko. En Turku



Inter la plej originalaj kreaĵoj de finnlandaj arkitektoj estas la variaj formoj de la modernaj preĝejoj. La preĝejon Kaleva en Tampere projektis Reima Pietilä, unu el la arkitektoj de la unika kongresejo de la 54a UK. (Vidu p. 41). Dum la cent jaroj da rusa regado super Finnlando levigis granda nombro da rus-ortodoksaj preĝejoj. Nuntempe ili pli ol sufiĉas al la bezonoj, ĉar el la nuntempaj religianoj 97% estas luteranoj kaj nur 2% ortodoksaj.

mi alvenis tro frue ĉe iu familio: ankoraŭ revenis nek la patro nek patrino. Sed sen eĉ eta palpebrumo da maltrankvilo akceptis min la filino 12-jara, verŝante kafon, proponante kukojn, konversaciante mondanece kvazaŭ mem la dommastrino.

Eble tro serioza, tiu popolo? S-ro Milton, la tradukisto, plenditis al mi iom nostalgie, ke finnoj rigardas glitadon per ordinaraj ŝuoj kiel amuzojn por infanoj (kvankam preskaŭ ĉiu finnlandano volonte skias aŭ glitkuras).

Tro seriozaj? Tamen ili scipovas ŝerci, kaj pri Prezidanto Kekkonen ekzistas eĉ tuta libro da anekdotoj, al kiu laŭdire li mem kontribuis nemalmulte. Jen specimeno:

Kekkonen promesis fari oficialan viziton al brut-ekspozicio en kampara urbeto. Sekve la organizantoj bonorde presigis programon:

10.00 horo - Bovoj

10.30 horo - Ŝafoj

11.00 horo - Porkoj

12.00 horo - La Prezidanto de la Respubliko

13.00 horo - Komuna lunĉo.

Tro seriozaj? En Jyväskylä oni regalis min per belegaj popolaj kantoj, sed tuj pardonpetis, ĉar "bedaŭrinde finnaj popolkantoj estas ofte tro sentimentalaj kaj malgajaj. Ili ĉiam rakontas pri nia malfacila vivo kaj pri la longa vintra mallumo."

Sed la finnoj ne plu havas tiel malfacilan vivon. La grandega ekonomia kaj teknika progreso malaktualigis ĉiujn popolkantojn. Reprezenta por la juna generacio estis mia gvidanto en Tampere, urbo de 450 fabrikoj, "ne kalkulante la malgrandajn". Rainer Arvola, la junular-delegito de UEA, estas freŝ-vizaĝa 22-jarulo, dekoracifakulo. Jam edzo, li vigle interesiĝas pri aktualaj demandoj, eklernis krom Esperanto la anglan, svedan, francan, germanan, italan kaj rusan, kaj havas grandan deziron vojaĝi.

Multaj finnoj kutimas libertempi ĉe la lagoj, kie ili ĝuas la trankvilon de la naturo kaj disponas ofte proprajn somerdometojn. Sed ĉiam pli multaj flugas al Kanarioj aŭ Mallorca.

Eble la sola escepto de la ĝenerala bonfarto estas la ciganoj. Escepto per sia pli varma temperamento, escepto per sia kostumo (la longaj jupoj de la ciganinoj, memorigaj pri ilia hinda deveno, ŝajnis aparte fremdaj en la neĝo de januaro), ili estas hodiaŭ la plej malriĉaj finnlandanoj. Parte ili estas fikse loĝigitaj, parte ili ankoraŭ migradas. Taksoj pri la nombro de ciganoj varias inter 1000 kaj 4000. Kvankam ili bone parolas la finnan lingvon kaj la infanoj estas diligentaj lernantoj, la ciganoj daŭre prezentas problemon "por ni blankuloj" — tiel oni informis min.

Ĉu la alta vivnivelo — kun tiu escepto — signifas, ke Finnlando estas lando multekosta por la turistoj?

Dependas unue de tio, ĉu la turistoj venas el lando riĉa aŭ malriĉa! Mi komparas kun Nederlando — lando, kiun jam konas multaj kongresanoj pro la kongresoj en 1964 kaj 1967. De post la devalorigo de la finna marko en 1967 ne estas ia rimarkebla diferenco inter la kostoj en Finnlando kaj tiuj en Nederlando. Jen iu prezo estas iom pli alta tie, jen iom pli malalta. Kongresontoj notu, ke en somero oni povas la tutan tagon veturadi en la iom malnovastilaj tramoj de Helsinki per bileto de 2 markoj. Notu krome, ke nenie oni aldonas servomonon al la fiksita prezo: nek en restoracio, nek en taksio, nek ĉe barbiro. En restoracioj oni tion jam enkalkulas en la fakturo. Nur al vesto-gardisto estas kutime doni iun moneron.

Kiel preskaŭ ĉiu alia popolo, finnlandanoj plendas laŭte pri la alteco de la impostoj. Kvankam ne ekzistas ia garantiita minimuma salajro (tion la sindikatoj kontraŭstaras), en la praktiko preskaŭ ĉiuj enspezas minimume 3-4 markojn hore. En la ĵusa kaj en la antaŭa vintroj estis tamen sufiĉe da senlaboreco. Oni atendas, ke baldaŭ sentiĝos la pozitivaj efikoj de la devalorigo en 1967. Ĝis tiam, tamen, la ekonomia bildo ne estas tute sen makuloj.

Paradizo perdita — kaj malkovrota

La urba vivo en Helsinki, Tampere aŭ Turku estas tiu de 1969: la telefonejoj estas akustikaj konkvoj el travidebla plasto; la televido montras manifestaciojn en Britujo kaj Italujo, batalojn en Vjetnamujo, malsaton bifafran; la junularo diskutas pri grupa sekso kaj novaj moroj. Milionoj da urbanoj sopiras al eskapo el tiu mondo. Oni iras libertempi ĉiam pli malproksime. Unu Beatle aĉetas al si propran insulon por foje resti sola. En la maldense loĝata Finnlando ankoraŭ eblas trovi solecon, trovi tempon kaj lokon por mediti: pri si mem, pri la naturo aŭ pri nenio...

Kiel sin tenas Finnlando politike?

Internacie, ĝi nomas sin neŭtrala. Tion oni tre zorge emfazas. "Ne gravas, kian miskoncepton oni havas pri nia vivnivelo aŭ pri nia popolo" — tiel deklaras ministerianoj — "sed miskonceptoj pri nia politika pozicio estas tre gravaj. Iuj imagas, ke ni estas membro de OTNA, aliaj, ke ni aliĝis al la Varsovia Pakto. Ili eraras. Ni estas neŭtralaj."

Mi demandis al "nur Leppäkoski", kiel li kutimas sin titoli, la tradukinto de Kalevala en Esperanton, mem eks-jurnalisto, kiel li vidas la evoluon de Finnlando en la lastaj jardekoj. Li paŭzis por ekbruligi cigaredon kaj ordigi siajn pensojn.

"Precipe post la du militoj — la Vintra Milito de 1939-40 kaj la milito de 1941-44 — ĉio radikale ŝanĝiĝis, preskaŭ salte evoluis. Parte servis kiel modelo Svedujo, kiu havis altan vivnivelon kaj pro sia politika neŭtraleco vivis 160 jarojn en paco.

"La nuna regadsistemo de Finnlando ŝajnas al mi preskaŭ ideale demokrata. Nia Prezidanto Ståhlberg siatempe planis la konstitucion, kaj ĝi estas tiel bone verkita, ke ĝiaj principoj eltenis eĉ la militajn tempojn. Tiutempe eĉ ne unu homo postulis ion kontraŭkonstitucian.

"De post mia juneco la plej granda ŝanĝo estas sendube la ekonomia. Tiam, nur tiom da gejunuloj finis mezlernejon, kiom hodiaŭ finas universitaton.

„Sed la evoluo direkte al urbaneco iris tro rapide. La infanoj tro rapide forgesas la kutimojn kaj la humanecon de la kamparanoj. Ili fariĝis malmolkoraj, precipe en la grandaj urboj, Helsinki kaj Tampere. La kamparo degeligas la malmolecon de la koroj. Kvankam junuloj estas fieraj pri sia urbaneco, ili tamen luas somerdometojn ĉe la lagoj por iom forigi la urban enuon kaj transponti la abismon inter urbo kaj kamparo."

La vortojn de J.E. Leppäkoski mi reaŭdis, kiam en malfrua vespero mi babilis kun emerita lernejestrino Irja Klemola, vic-prezidanto de LKK.

"Mi jam ne apartenas al tiu ĉi tempo." Sinjorino Klemola skuis decidite la kapon. "Por mi la plej bedaŭrinda estas la malapero


de la hejma vivo kampara. Por mi la kamparo ĉiam signifis tiel multe, ke mi ne povas diri. Mi memoras el mia infaneco, kiel mi piediris al lernejo tra malgrandaj vojetoj, kiujn eble tute neniu alia iris tiun tagon. Jes, ekzistas ankoraŭ iom da kampara vivo, kompreneble, sed ĝi malkreskadas."

Mi atendis la daŭrigon, sed ŝi momente revivis en revoj la perditan Finnlandon de antaŭ sesdek jaroj. Poste: "Jes, bovinoj kaj kokinoj estas en mia sango. Mi jam ne apartenas al tiu ĉi tempo."

Paradokso. En Finnlando, vasta fabellando da kampoj, lagoj kaj arbaroj, oni priploras la malaperon de la kampara vivo. Prave, jes. Sed

en kelkaj landoj de la eŭropa kontinento oni jam vidas la malaperon de la kamparo entute. En Finnlando preskaŭ ne ekzistas loko, de kie ne vidiĝas arbaro. Sed en kelkaj regionoj de la kontinento preskaŭ ne ekzistas loko, de kie ne vidiĝas domoj. Por la pli aĝa generacio en Finnlando, ĝi estas paradizo perdita. Por turistoj el multaj pli industriaj landoj, ĝi estas paradizo ankoraŭ malkovrota.

La bela Suomio ne estas ia vantulino, pri kiu dungo-poetoj elhakaŝ odojn. Ŝi ne scias sin reklami kaj scivolas modeste, kial ŝiaj fratinoj allogas pli da amantoj. Sed kiu trovos kaj gustumos ŝian freŝan ĉarmon, tiu ankaŭ revenados al ŝi fidele, fojon post fojo.





Ili parolas unu el la malmultaj ne-eŭropaj lingvoj de Eŭropo. Komprenas ĝin, el ĉiuj aliaj popoloj, preskaŭ sole nur estonoj. Tiel lingve, kiel geografie, la finnoj estas nacio izolita...

Kion parolas finnoj

Vilho Setälä

akcento estas ĉiam sur la unua silabo). La vokaloj estas dividendaj en du ĉefaj grupoj, el kiuj nur unu povas troviĝi en ĉiu nekunmetita vorto. La unua grupo konsistas el a, o, u, la dua el ä, ö, y, dum e kaj i estas neŭtralaj — do estas akcepteblaj al ĉiu vorto. Tial la plejparto de la fleksiaj finaĵoj estas duoblaj: talo = domo, talossa = en domo, kylä = vilaĝo, kylässä = en vilaĝo.

La malriĉeco de konsonantoj estas duobla: ekster tio, ke ili estas proporcie maloftaj kaj ke neniu vorto povas komenciĝi per pli ol unu konsonanto, plene mankas en origine finnaj vortoj la konsonantoj b, d, g, z, f, ŝ, ĉ, ĵ, ĝ. Ekz. la ĝermandevena 'skaŭniz' — = bela fariĝis 'kaunis', la sveda 'skriv' = ŝraŭbo fariĝis 'ruuvi'. Centre de la vorto tri konsonantoj estas maloftaj, kaj ĉiam la unua el ili estas aŭ n aŭ l aŭ r: 'virsta' (mezuro de vojo, iom pli ol km), 'konsti' = artifiko, 'pulska' = pompa. Vorto povas finiĝi per maksimume unu konsonanto, kaj ĝi estas ĉiam unu el jenaj: l, n, r, s, t, tre malofte m. La konsonanto meze de vorto povas esti simpla aŭ duobla; ĉe la duoblaj la limo inter la silaboj meze de ĝi estas aŭdebla kiel malfortiĝo, ekz. 'olla' = esti estas prononcata 'ol'-la'. Ĉe la eksplodaj konsonantoj la duobliĝo fakte aperas kiel paŭzo, dum kiu la buŝaj organoj kvazaŭ atendas en la pozicio de la atendata konsonanto: 'mutta' = sed: 'mu'-ta'.

La ortografio estas fonematika. La sola manko estas, ke ne ekzistas aparta litero por la sono palatnazala, skribata per ng (kiel en pluraj aliaj lingvoj) aŭ nur per n antaŭ k, kie ĝi ĉiam aperas.

Kio koncernas la gramatikon, ekzistas nur unu deklinacio kaj unu konjugacio. Unu adjektivo 'hyvä' = bona havas komparativon kaj superlativon el alia radiko, ol la pozitivon, kaj nur ĉe unu verbo 'olla' = esti la tria persono de indikativa nuntempo havas neregulan formon. Anstataŭ prepozicioj la lingvo uzas sufiksojn, kiujn oni registras kiel 15 kazojn. Eble tio ŝajnas malfacila, sed fakte ne estas pli granda peno lerni tiujn, ol 15 prepoziciojn. La signo de multenombro estas en ĉiuj oblikvaj kazoj, por ĉiuj substantivoj kaj adjektivoj 'i', inter du vokaloj 'j'. Koncerne verbojn, la personaj finaĵoj estas similaj sendepende de tempo kaj modo; pasintan tempon indikas 'i' (hazarda koincido kun Esperanto), la kondiĉan modon 'isi', kompreneble por ĉiuj verboj.

La finna lingvo apartenas al la balta branĉo de la finna-ugra lingvofamilio. La sola alia lingvo en la branĉo, kiu havas literaturon, estas la estona — preskaŭ same proksima parenco, kiel la dana al la sveda. El la pli malproksimaj parencoj la plej konata estas la hungara, tamen same malproksima kiel la rusa al la germana. Por eviti miskomprenojn ni akcentu tion, ke la lingva parenceco havas nenian rilaton al eventuala biologia parenceco.

Estas multaj pruvoj en la vorttrezoro finna, kiuj atestas pri kontaktoj kun aliaj lingvoj. Ekz. la finna 'sata' = cent evidente devenas de la sanskrita de antaŭ multaj miloj da jaroj, kaj multegaj pruntvortoj atestas pri kontaktoj kun gotoj kaj kun la malnovaj baltaj lingvoj, daŭrintaj dum multaj jarcentoj antaŭ ĉ. dumil jaroj aŭ pli. La fakto, ke kontraŭe neniu el la lingvoj devenantaj el tiuj enhavas vortojn pruntitajn el la antikva finna lingvo, rakontas pri tio, ke la triboj nomitaj malaperis alpreninte la finnan lingvon, kaj samtempe pliriĉigis ĝin per siaj propraj vortoj. El la enhavo de tiuj vortoj oni povas konjekti, ke la gotoj kaj baltoj havis pli evoluantan socian ordon, dum la finnoj posedis pli riĉan spiritan kulturon — poezion kaj fabelaron.

La finna lingvo estas tre konservema. Tiel ekzemple 'kuningas' = reĝo estas ankoraŭ en la sama formo kiel antaŭ dumil jaroj, dum oni diras svede 'kung', angle 'king' kaj germane 'König'. Tion pravas ankaŭ la riĉeco de vokaloj kaj diftongoj en la lingvo: 50:50 % kontraŭ la konsonantoj, dum ekz. la germana montras la rilaton 36:64. Longaj vokaloj kaj diftongoj troviĝas ankaŭ en la neakcentitaj silaboj (la

Abundas sufiksoj

Ioman komplikajon kaŭzas la fakto, ke vortoj kun la eksplodaj konsonantoj k.t.p. havas "fortajn" kaj "malfortajn" formojn — ekz. 'ukko' = maljunulo, 'uko-lle' = al maljunulo — sed ĉi tiu variado sekvas preskaŭ plene regulajn leĝojn.

Kelkaj sufiksoj aspektas strangaj al eksterlandano, sed por komencanto ili ne estas gravaj. Ekz. Anstataŭ 'Kun olin laulanu' = kiam mi estis kantinta oni povas (sed ne devas) diri 'laule/tua/ni', kies laŭorda deĉifro estas 'kanti/pasinta/mia'. Ekzistas ankaŭ sufiksoj kun la senco 'ankaŭ', 'ja' (emfazo), 'ĉu'. Negacion reprezentas vorto kun verba paradigmo.

La derivada sistemo estas riĉa: ekzistas granda nombro da sufiksoj. Veraj prefiksoj estas malmultaj, sed kiel sufiksoidoj funkcias diversaj mallongaj adverboj kun sencoj similaj al la

prepozicioj en Esperanto (ekz. sub, super, preter, mem, mez', inter, ekster, intern', fiks' ktp.). La sistemo kompreneble ne estas same strikte logika kaj regula kiel en Esperanto, sed kun la paso de tempo ĝi tendencas al plireguliĝo, precipe en la scienca kaj teknika uzo. La evoluo de la lingvo, kiu antaŭ 150 jaroj ankoraŭ estis taŭga nur por la bezonoj de agrikultura rondo, ĝis moderna ĉiopova kultura lingvo, baziĝis ĉefe sur la pliriĉigo de la glosaro per la deriva sistemo, pli vaste aplikata ol en iu alia eŭropa lingvo, uzante la proprajn trezorojn de la lingvo. Per tio la kultura lingvo finna estas pli facile atingebla de larĝaj tavoloj de la popolo, eĉ per memlernado. Certe, tio limigas la rektajn kontaktojn al aliaj lingvoteritorioj. Sed por tio ni ja havas la internacian lingvon.

Por fini ni citu peceton da finna teksto.

Suomen kansallisen itsetunnon kehitys viime vuosisadalla
Finnlanda nacia memkonscio evoluo lasta jarcento-en
La evoluo de la nacia memkonscio de Finnlando dum pasinta jarcento

kasvoi kansatieteen ja kielitieteen tulosten ja saavutusten
kreskis de-etnologio kaj de-lingvoscio rezultoj kaj atingoj
kreskis sur la fundamento de la rezultoj kaj atingoj de etnologio kaj lingvoscienco,

pohjalta, säteillen sitten vähitellen kirjallisuuteen, kuvaama-
fundamento radiante tiam iom-post-iom al-literaturo al-bel-
radiante iom-post-iom al literaturo, belartoj

taiteisiin seka luonnontieteisiin ja tekniikkaan.
artoj same kiel al-natursciencoj kaj tekniko.
same kiel al naturscienco kaj tekniko.

Por la plimulto da eksterlandaj gastoj domurskriboj k.s. restas enigmaj. Eĉ vortoj internaciaj aperas kamufflitaj: **KANSALLISPANKKI = NACIA BANKO.**





Saŭno ĉiam ludis
gravan rolon en
la vivo de la
finna popolo.
Prafinoj ĝin
konstruis kiel
loĝejon; poste
kampanoj tie
sekigis kanabon
kaj linon kaj
maltgrajnojn por
bierfarado, kaj
fumajis viandon.
La etoson de
saŭno vive re-
donas la ĉi-suba
traduko de Pekka
Mäntyjärvi.

HEJMA BANEJO

**Juhani
Aho
(1861-1921)**

Mia kara, malnova saŭno, plej altvalora ekzemplero de la finna saŭno, kiu estas nia plej persista memoraĵo el la antaŭaj tempoj en Altaĵ. Mi volas nun laŭdi ĝin, renomigi ĝin antaŭ la mondo, proklami la famon de la modesta griza kabano, kiu kaŭras en loko pli malalta, al aliaj konstruaĵoj de la bieno, kaj staras apud la vojeto, kiu kondukas al valo, kvazaŭ ĝi volus flanken por neniun ĝeni.

Ja ne senprave mi laŭdas la virtojn de mia malnova saŭno.

Car ĝiaj fulgaj muroj vidis min naskiĝi kaj aŭdis mian unuan ploreteton. El ĝia aminda vaporo oni portis min eksteren en la malvarman mondon, sed mi kriegis kiel demonigito, ĉar al mi ne plaĉis resti en tiu ĉambrego, kies troa lumo blindigis al mi la okulojn.

Kaj kiam mi pli kreskis kaj komencis iri proprapiede, tien mi paŝetis post la patrino por ruliĝi sur la pajloj kaj nude plaŭdadi ĉe la akvokuvo. Nur tie la rido eĥis kaj infana ĝojo tute eksplodis.

Kun ia mistera tremo kaj timo mi poste tutsola katpaŝe tien iris por de la sojlo rigardi la angulon sub la kuŝbretaro, kiu ankaŭ dumtage restis malluma kaj kiu ŝajnis al mi kvazaŭ la vestiblo de ia nekonata mondo subtera, kie loĝas nur infanoj kaj el kie ankaŭ al mi aperis ĉiujare novaj fratoj kaj fratinoj. Kaj tiam mi unuafoje komencis cerbumi pri tiaj enigmoj kaj demandoj, por kiuj neniu povis doni al mi ĝustan klarigon kaj respondon.

Kaj kiel mian unuan amikon mi elektis la maljunan Petron — almozulon, kiun oni forpelis el la granda ĉambro kaj kiu serĉis rifuĝejon en la saŭno, kie li bruligis longajn splitojn por lumigi la ĉambreteton. Tie mi ofte vizitis lin kaj restis ĉe li la tutan verperon por aŭskulti liajn fabelojn, tremante por ekscito kaj dolĉa timo; kiam la malluma nokto enrigardis tra la malgranda fenestro kaj la picarbaro ĝemis kaj muĝis malantaŭ la muro... aŭ mi staris dum longaj momentoj ekster la pordo, rigardante la brileton de la steloj kaj la fajretadon de la nordaj lumoj sur la nokta ĉielo... aŭ mi sola aŭskultadis la grilon ĉirpi inter la forno kaj la muro, dum la tuta cetera mondo dormis kaj nur la frostego preterire frapetis per sia bastono la angulon de la saŭno.

Sed mi elkreskis viro, kaj oni devigis min iri en la vastan mondon, tremi sub ĝiaj malvarmaj ventoj. Nenion alian mi tiam sopiris tiel forte, kiel mian hejman banejon. Kaj kiam miaj vojoj rekondukis min al la hejma vilaĝo, plej unue miaj okuloj serĉis la saŭnon. Kaj nur tiam la hejmo fariĝis vera hejmo, kiam akvo ĉerpita el fonto de la valetto, kie kreskis bonodoraj herboj, siblis sur la ŝtonoj de la saŭnoforno kaj freŝaj betulbranĉetoj fomentis miajn lacigitajn membrojn.

Nur tiam mi fine sentis, ke la makuloj de vagado tra la mondo estis tute forlavitaj el miaj animo kaj korpo. Kaj dronante en lace-dolĉaj revoj mi sidadis sur la alo-trunko de mia naskiĝosaŭno, dum antaŭ mi kuŝis kampo, herbejo kaj kvietaj lago en silento kaj la somera venteto refreŝigis min kaj lulis miajn sencelajn pensojn.

Mia malnova, kara saŭno...

Kiam la mondo iam lasos min eskapi, tien mi retiros min por elvivi miajn lastajn jarojn, kiel maljuna reto-faranto.

LA JUNA VIVO



**Oficiala organo de TUTMONDA
ESPERANTISTA JUNULARA
ORGANIZO.**

**Respondecas: Robert Lloancy,
LJV, rue de la Marinade,
F-66-Tresserre, Francujo.**

La junularo alvokas

NE KIEL NEĈAJEV ! AĜLIMO NE MALHELPAS KUNLABORON

Per radikala paŝo solvi la problemojn de la mondo: tion celis la rusa anarkiisto S. G. Neĉajev (1847-1882). Laŭ li, ĉiuj homoj pli aĝaj ol 25 j. devus esti eliminataj, por ke la gejunuloj povu senĝene transformi la socion laŭ siaj imagoj.

Ankaŭ TEJO, la junulara sekcio de UEA, atentis la aĝlimon de 25 jaroj, ankaŭ ĝi celas solvi mondan problemon, la lingvan, sed kontraŭe al Neĉajev ĝi ne intencas tion fari per radikalaĵoj, almenaŭ ne direktitaj kontraŭ pliaĝuloj. Kvankam pro organizaĵoj kaj varb-psikologiaj konsideroj ĝi akceptas membrojn nur ĝis 25 jaroj, ĝia laboro okazas en la kadro de la tuta movado por disvastigo de Esperanto kaj en kiel eble plej intima kunlaboro kun homoj pasintaj la aĝlimon.

REZERVEJO SEN MONO

Tiu aĝlimo do ne estas batalilo en la manoj de la Esperanta junularo, sed kelkrilate eĉ handikapo: ĝi kaŭzas konstantan fluon de la membraro. Apenaŭ enirinte la vicajn de TEJO, la junulo denove malaperas, kiam li atingas la decidan jaron... TEJO do daŭre provizas la ĝeneralan movadon per freŝaj fortoj, sed mem ricevas membrojn ne samkvante kaj same regule. Ĝi faras grandajn penojn por membrigi lernantojn kaj studentojn, por perdi ilin tre baldaŭ.

Sed la plej grava kaj dolora sekvo de tiu ĉi manko de kontinueco prezentigas en la buĝetaj rimedoj, kiuj estas tute ne proporciaj al la labortaskoj de TEJO. La junulara movado estu konstanta rezervejo de novaj talentoj por la ĝenerala movado, dum la plej multaj financaj kapabloj estas atingeblaj kaj riceveblaj ĝuste de homoj pli ol 25 j. TEJO, do, se oni adekvate taksas ĝian rolon enkadre de la movado, devus atendi la necesan respekton inkluzive de aktiva subteno, por ke ĝi plenumu almenaŭ la plejparton de tiuj devoj, kiujn oni atribuas al ĝi. Oni ne permesu, ke la gvidantoj de la junulara movado foruzu siajn fortojn en troa rutino aŭ senĉese baraktu kun financaj malfacilaĵoj, dum samtempe ili povus dediĉi siajn energiojn kaj entuziasmon al amaso da pozitivaj laboroj.

ĈU KONFLIKTO DE GENERACIOJ?

La esperantistoj ankoraŭ ne sufiĉe notis kaj taksis la fakton, ke en la Esperanto-movado ne ekzistas nun plu tiu konflikto de generacioj, pro kiu suferas aliaj homgrupoj kaj kiun tiel draste karakterizis Neĉajev. Flanke de la junularo ne (plu) necesas kritiki la plenaĝulojn, kondiĉe ke tiuj observas siajn proprajn principojn, ekz. tiujn de Frostavallen. Kaj TEJO same ne pretendas okupi poziciojn de plenaĝuloj, sed kompreneble estas je dispono, se ĝiaj agantoj estas elektitaj por oficoj en la ĝenerala movado. Sed se nuntempe oni invitas la junularon transpreni pli respondecajn funkciojn, per tio pli-malpli eksplicite agnoskante la valoron de edukigo en TEJO, tiam ne eblas samtempe riproĉi la junularon pro tio, ke ĝi ne sukcesas iĝi finance sendependa! Ne temas pri neemo de TEJO akcepti kritikon (tion ĝi eĉ pli akceptas, ol mem donas), sed ĝi ja atendas iom pli da kompreno kaj ne atakojn kontraŭ ekz. unu el ĝiaj plej gravaj agadoj, la nepre modela NEJO-agado.

Tia agadmaniero povus ja konduki al konflikto de generacioj, aŭ pli ĝuste al iom neegala batalo (ekz. nuligo de subvencioj), ĉi-foje ne kaŭzita de junulara ribelemo, sed de oldulara kritikemo kaj manko de perspektivoj.

Tuterte TEJO daŭrigos sian vojon, prefere kunlabore kun la pliaĝuloj, konscience plenumante siajn taskojn, edukante gvidantojn por la ĝenerala movado, ne fanfaronante pri ĉiuj sukcesetoj, spertigante per eraroj kaj fiaskoj. Kaj ĝi esperas, ke ĉiuj trans la aĝlimo vidos la bonon de tio por la estonteco de la Internacia Lingvo.

Ulrich Lins

Valoras memori, ke TEJO eldonas luksan revuon, kiun redaktas — ankaŭ por homoj pli ol 25 j. — elstara profesia ĵurnalisto, Roman Dobrzyński. Jarabono (por 4 n-roj) estas 8 guld., sed kontraŭ 16 guld. povas ĝin ricevi t.n. Patronaj Membroj A, kiuj aparte komprenas la rolon de TEJO kaj deziras ĝin efike subteni. Se ili petas, ili krome ricevos la dumonatan bultenon Novaĵoj de TEJO. (Kiel Patrona Membro oni ricevos ĝin, same je aparta peto, paginte jaran kotizon de 5 gld.)

Cetere notu, ke la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam estas samtempe la CO de TEJO, kien do direktu viajn konsilojn, petojn — kaj mendojn.

La 25a, jubilea Internacia

JUNULARA KONGRESO

de TEJO okazos en Tyresö, moderna antaŭurbo de Stokholmo, en helpejzaĝa ĉirkaŭaĵo, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto, do tuj post la UK. Ĉefa temo: "Junularo kaj socio". Kiu aliĝas antaŭ la 31-a de marto, tiu pagas malpli altan kotizon. Adreso: 25a IJK, Myggdalsvägen 123, S-135 00 Tyresö, Svedujo.

Oficiala informilo

N-ro 421, 1 februaro 1969

Pli vaste en 1968

LAŬLANDA MEMBRO-STATISTIKO 1968

La plej okulfrapa aspekto de la membraro de UEA estas — se ni momente flankenlasas la fakton, ke ĝi estas multe tro malgranda — la malegaleco de la geografia distribuo. Ankoraŭ ĉiam la proporcio en ekstereŭropaj landoj restas sub la eŭropa nivelo. Tio precipe validas por Afriko kaj Azio, kaj estas ekster dubo, ke la firmigo de la lingvo en tiuj kontinentoj estas unu el la plej urĝaj ĝeneralaj taskoj, kiuj frontas nin.

Feliĉe, la distribuo plivastiĝis en 1968: de 79 al 84 landoj. Sed komparo kun la nombro de landoj membrigintaj al Unuiĝintaj Nacioj, ekzemple, (123 en 1968) montras, ke tute ne mankas eblecoj por pionira laboro, por instruado de Esperanto kaj konatigo de la Asocio en novaj teritorioj.

La nuraj ciferoj de unuopaj landoj ne permesas tuj konkludi, kia ŝanĝo okazis en la membraro. Jes, se temas pri kresko: saltis la individua membronombro en Jugoslavio de 212 ĝis 332; kreskis la asocia membraro de Bulgarujo per ronda milo. Sed tie, kie komparo kun la pasinta jaro montras malfavoran rezulton, ankoraŭ ne estas certe, ĉu temas pri fakta perdo ĉe la landa asocio aŭ nur pri escepta pago-prokrasto. Pri Brazilo, Germanujo kaj Kanado, do, kies asocia membraro draste falis, restas espero, ke la bildo pliheliĝos tre baldaŭ.

Entute: Statistiko malegala, kunmetita el gajnoj kaj perdoj, sed antaŭ ĉio konsciiga, ke necesas labori, kiel neniam antaŭe!

Lando	Individuaj Membroj	Asociaj Membroj	Entute
Albanujo	1	—	1
Alĝerio	3	—	3
Angolo	1	—	1
Antiloj	1	—	1
Argentino	45	248	293
Aŭstralio	140	124	264
Aŭstrujo	108	300	408
Belgujo	138	500	638
Brazilo	260	206	466
Britujo	554	965	1519
Bulgarujo	120	5100	5220
Cejlono	5	—	5
Ĉeĥoslovakujo	190	—	190
Cilio	1	—	1
Ĉinujo	7	—	7
Danlando	185	815	1000
Ebura Bordo	1	—	1
Etiopujo	2	—	2
Filipinoj	1	—	1

Finnlando	257	—	257
Francujo	617	862	1479
Gano	1	—	1
Germanujo	495	1320	1815
Grekujo	14	267	281
Gvatemalo	1	—	1
Gvineo	1	—	1
Hindujo	16	—	16
Hispanujo	229	490	719
Honduroj	1	—	1
Honkongo	4	—	4
Hungarujo	83	3100	3183
Indonezio	8	—	8
Irako	1	—	1
Irano	3	—	3
Irlando	6	—	6
Islando	21	—	21
Israelo	50	200	250
Italujo	279	1320	1599
Japanujo	249	1400	1649
Jugoslavio	332	1500	1832
Kameruno	2	—	2
Kanado	114	133	247
Kenjo	2	—	2
Kipro	1	—	1
Kolombio	8	—	8
Kongo (Dem. Resp.)	10	—	10
Koreujo	15	—	15
Kostariko	1	—	1
Kubo	2	—	2
Libano	2	—	2
Liĥtenstejno	1	—	1
Madagaskaro	16	17	33
Malajσιο	1	—	1
Malio	2	—	2
Malto	2	—	2
Maroko	2	—	2
Meksiko	21	—	21
Monako	6	100	106
Mongolujo	4	—	4
Mozambiko	1	—	1
Nederlando	502	790	1292
Nigerio	2	—	2
Norvegujo	94	434	528
Nov-Gvineo	1	—	1
Nov-Zelando	102	211	313
Pakistano	1	—	1
Peruo	1	—	1
Pollando	288	3100	3388
Portugalujo	25	—	25
Rumanujo	36	—	36
Saŭdi Arabio	1	—	1
Senegalio	6	—	6
Soveta Unio	132	—	132
Sudafriko	30	—	30
Sudano	1	—	1
Svedujo	546	1303	1849
Svislando	228	100	328
Tanzanio	2	—	2
Turkujo	3	—	3
U.A.R.	2	—	2
Urugvajo	10	50	60
Usono	439	318	757
Venezuelo	10	—	10
Zambio	1	—	1
84 landoj	7107	25273	32380

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de majo neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Nederlando: Robert Moerbeek. Pollando: Edmund Sidorowicz.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1968)

Britujo: Alfreton. Francujo: Chelles. Hispanujo: Barcelona (FD Filatelo). Italujo: Torino (FD Juro). Pollando: Warszawa (VD). Svislando: Le Locle.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Adelaar, f-ino L., Nederlando.

Manteca López, s-ro Miguel, Hispanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1968

287 Bodson, s-ro Claude, Francujo. 288 Rouseau, s-ro H., Kameruno.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1969

55 Hanson, S-ro C. G.; 56 McConnochie f-ino D., Britujo. 57 Ihander, f-ino O. M.; 58 Jakobson, s-ino Ulla; 59 Narvala, s-ro N. G.; 60 Penttilä, prof. Aarni; 61 Stoor, s-ino Brita; 62 Vilkki, s-ro Joel, Finnlando. 63 Enriquez de Salamanca, d-ro A., Hispanujo. 64 Laverman, f-ino A. A., Nederlando. 65 de Jong, s-ro H., Sudafriko.

DONACOJ (Gld.)

Generala Kaso: Aŭstralio: Browne, s-ino A. G., 5,81. Britujo: Davies, f-ino M., 25,71. Francujo: Belhoste, s-ro 70,—. Germanujo: Liebl, s-ro Franz, 17,25; Wehrheim, d-ro, 63,04. Honkongo: McLintock, s-ro W. J., 10,—. Nederlando: Dijkstra, s-ro W. J., 5,—. Svisujo: Matthey, s-ro Wilh., 100,—.

Patrono A. de TEJO: Britujo: Parson, f-ino E. L. Japanujo: Umeda, s-ro Yoshimi. Kanado: Lewis, s-ro H. J. Svedujo: Almén, s-ro Paul.

T.E.J.O.: Francujo: Lavarenne, 15,70; Tavernier, 5,—.

Fondaĵo Canuto (por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Danlando: Jørgensen, s-ro G., 2 MA. Germanujo: Wilke, s-ro H., 1 MA. Italujo: Minnaja, s-ro L., 2 MA. En 1968 la Fondaĵo Canuto ebligis al UEA sendadi la revuon "Esperanto" kaj la Jarlibron al entute 233 membroj, kiuj alie ne havus eblecon pagi la kotizon.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: Francujo: Tavernier, s-ro, 14,—; Vincent, s-ino J., 7,—. Germanujo: Wolff, s-ro J., 5,40.

Internacia Arta Teatro: Italujo: Minnaja, s-ro L., 50,—.


Fondaĵo Azio-Afriko: Italujo: Bardini, s-ro Mario, 10,—. (Amikoj de Hindujo).

Fondaĵo Officeja Ilaro: Japanujo: Hugiimoto, s-ro Tacuo, 10,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

FERIU EN JUGOSLAVIO



INTERNACIA ESPERANTA FERIO-CENTRO VOLPARIJA — JUGOSLAVIO

IEFC situas meze de pina arbareto, sur la okcidenta marbordo de la duoninsulo ISTRIO, kun milda mediteranea klimato kaj vegetaĵaro, kio prezentas al la gastoj agrablan kaj trankvilan ripozon. IEFK disponas pri tri vilaoj kun entute 150 litoj en 2-3-litaj ĉambroj. Propra strando kun cementita plato por sunumado. Bansezono: De la 15-a de majo ĝis la fino de septembro.

La administranto kaj kelneraro parolas Esperanton!

Ekzistas eblecoj por ekskursoj al Portoroj, Koper, Postojna (mondfamaj grotoj), Lipica (mondfama ĉevalbredejo), Poreč, Pula, al proksima Italujo ktp.

Kompleta pensio: De 2,70 ĝis 3,60 US dol. aŭ egalvaloro. Por grupoj specialaj kondiĉoj! Postulu senpagajn prospektojn!

IEFC de Esperanta societo, Ljubljana,
P.f. 401 — Jugoslavio

Esperanto en radio

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Largentier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la januaran eldonon.

RADIO ROMA. 2-III, Tra la literaturo; 9-III, Novaĵoj el Italujo; 16-III, Italaj kanzonoj en Esperanto; 23-III, Leterkesto; 30-III, Kristana mondo; 6-IV, La itala pentristo Ambrogio Lorenzetti; 13-IV, La antikvaj Romanoj dum la festotagoj; 20-IV, Leonardo el Vinci en Lecco kaj Valsassina; 27-IV, La botanika ĝardeno ĉe Belluno. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto".

RADIO BUDAPEST jam dum tri jaroj prezentadis ĉiutagan programon en Esperanto. La dissendo de ĉiu labortago donas pririgardon pri la ĉefaj politikaj eventoj de la tago kaj informas pri diversaj novaĵoj de la Esperanto-vivo. Radio Budapest volonte respondas al demandoj ĉu en letero ĉu en la kadro de la programo, ĉiuvespere de 19.30 ĝis 19.45 (GMT), per ondoj 240 m (1250 kcs), 48.10 m (6234 kcs), 42.25 m (7100 kcs), 30.51 m (9833 kcs), 25.19 m (11910 kcs).

ANON CET OJ



Gelernantoj de Esperanto-kursoj el Vicenza, Italujo

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA, (2427 Padstow Cres., Clarkson, Ont., Kanado), povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi, kontraŭ 1 respondokupon, kompletan liston de siaj programoj.

Ĉeĥoj, poloj kaj jugoslavo. Ĉu vi interesiĝas pri regula, vigla korespondado. Skribu do al mi. S-ino Anne-Marie Frisk, Nygatan 84, 70213 Örebro, Svedujo.

Ferioj kun senco. Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu la antaŭkongresan semajnon (19.7 - 26.7.69) en la feria centro Kosmos en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri esperanto-problemoj. Feriado en bela dana naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94-96, DK 2000 Kopenhago F, Danlando.

H. Klein (33), adreso Burgemeester Sandbergstraat 34, Haarlem, Nederlando, instruisto pri matematiko, deziras korespondi kun dano, norvego, svedo, finno, ruso, polo, aŭ ĉeĥo.

Kvara klaso de elementa lernejo korespondus kun simila ekde septembro 1969. S-ino Vincent, 27-Les Andelys, Francujo.

La 3 danaj ministroj pri kulturo, instruado kaj eksterlandaj aferoj devas ricevi fortan impreson pri la uzado de Esperanto. Tial ni petas sendi al la ĉi-suba adreso 3 ekz. de ĉiuspecaj broŝuroj, klubaj informiloj, revuoj, libroj ktp. Post la transdono ĉiu kontribuinto ricevos raporton. Inĝeniero Ib Schleicher, Ved Bellahøj 21.13, DK-2700 Kopenhago BRH, Danlando. Prezidanto de Centra Dana Esperantista Ligo. Represo petata.

KORESPONDEMULOJ!

Se vi publikigos korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉi-monate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

Gelernantoj de Esperanto-kursoj el Vicenza (Italujo) — inter 17 - 50 j. — deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo, pri diversaj temoj. Skribu al Vicenza Esperanto-Klubo, Corso A. Palladio, 176, I-36100 Vicenza, Italujo.

Gekorespondantojn de 11-65 jaroj ni serĉas en okcidenta Eŭropo kaj en ekster-eŭropaj landaj. Respondo garantiita. Adreso: Esperanto, Box 25, Mělník, Ĉeĥoslovakujo.

Ĉu vi estas laca? Ĉu vi dormas malbone? Ĉu viaj haroj forfalas aŭ perdas sian tonon? Provu "Biolife" unika natura vegetala nutraĵo. Unumonata provizo kostas nur 10 ŝilingojn (20 stelojn) plus afrankon (3 stelojn). Laŭdo kaj mendoj por "Biolife" estas ricevataj ĉiun tagon de ĉiuj partoj de la mondo. Mendu de R. E. Plant Life (E) Market Hall, Farmers Avenue, Norwich, Britujo.

Por korespondadi tra la tuta mondo en lingvoj Esperanto, franca, angla, germana, hispana, aliĝu senpage al nia moderna Mondklubo. Sendu viajn adresojn, aĝon kaj vizaĝ-foton, kiuj estos publikigataj en nia monata gazeto. Vi ricevos sennombrajn leterojn. La gesamideanoj, kiuj deziras helpi nin, estos bonvenaj. Adreso: Klubo Paris 2000, B.P. 379, F.75-Paris 3, Francujo.

Venu al belega, marborda urbo de sudorienta Anglujo por viaj ferioj. Skribu al: S-ino V. Bateman, "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo.

Esperanto-Ferioj en Britujo, 16-23 aŭgusto 1969. Restado (du- aŭ tri-litaj ĉambroj) en modesta gastdomo apud Leeds. Limigita al 30 personoj. Prezo £ 18-10-0 inkluzive de ekskursoj. Detaloj pri la ferioj de f-ino W. Hirst, 140 Gramfield Road, Huddersfield, HD4 5QE, Britujo.

Letervespero okazos dum aprilo en Esperanto-Klubo, Y.P.I., 83 George Street, Hull, Yorkshire, Anglujo. Sendu bildkarton de via provinco. Ni rekompencos per bildkarto de Yorkshire.

Ni aranĝos letervesperon dum majo 1969. Ni respondos al ĉiuj. S-ro Henri Hardel, 9 rue de la Division Leclerc, 91 Epinay-sur-Orge, Francujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

H. C. ANDERSEN

" F A B E L O J "

(1-a volumo)

Traduko de D-ro L. L. Zamenhof

53 originalaj ilustraĵoj de A. Uniechowski

238-paĝa eleganta eldono kun trikolora ŝirmkovrilo.
Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon validan por
aĉeto de la eldonota 2-a volumo.

Sendante al sia libroservo la rabatkuponon enteni-
tan en la 4-a volumo de "Fabeloj" oni ricevos
rabaton de 0,30 us. \$.

Prezo: 3 us. \$ (+ 10% por sendokostoj)



Liveras la naciaj libro-servoj kaj la Libro-Servo de UEA

Eldonis: "Heroldo de Esperanto", 13 rue de la Reinette-Pippelingstr., Bruselo 1

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 48 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 18 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: \$ 4,50 (62 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Burleska — maldeca — satira

LA SKURILA LIBRO

Amuza mikspoto da legindaĵoj por ĉiaj gustoj verkita en Esperanto de

Adolf Sproeck

100 paĝoj kun plurkolora plasta kovrilo.
Prezo 6,— gld. aŭ 13,— danaj kronoj
ĉe Libroservo de UEA aŭ ĉe la eldonejo
Torben Kehlet, Ystadvej 11, DK-2850 Naerum.
Girkonto Danlando 7 95 58.



Jus aperis:

ENKONDUKO EN LA LIBRO-SCIENCON DE ESPERANTO

de Reinhard Haupenthal

Bibliografia gvidilo kun komentario.

Formato 13,5 x 21 cm, 44 p., Prezo 3,50 GM

Mendu ĉe

Ludwig Pickel, eldonejo, Postfach 2113,
D-85 Nürnberg 2, Germanujo aŭ UEA.



DUBLIN
53a Brita Kongreso de
ESPERANTO

Pasko 4-7 Aprilo
1969

PASKO EN IRLANDO !

LKK-Sekretario
'Woodbine',
Bluebell,
Dublin 12


Mendu jam nun !

La Libroservo de UEA nun jam akceptas antaŭmendojn por la n-ro 10 en la prestiĝa serio Oriento-Okcidento, la pli-ol-600-paĝa volumo

LA NOBLA KORANO

Pro ĵus anoncita subvencio de islama movado, la prezo estas malaltigita ĝis nur 20,— gld. + sendokostoj. Paralelaj tekstoj araba kaj Esperanta; bindaĵo el ledeca plasto.

Verko de Georges FRADIER
tradikita de C.D.A. CAPP
eldonita de U.E.A. kun
helpo de U.N.E.S.C.O.



ORIENTO KAJ OKCIDENTO

1,50 gld.
50 paĝoj

Ilustraĵo el "Oriento kaj Okcidento"
(Foto: UNESCO - Marc Ribaud).

La Feliĉo

kaj ses aliaj kantoj en esperanto

Kantas:

Ramona van Dalsem

akompanas:

TOOS SCHOONMAN

La plimulto de la tekstoj kaj melodioj estas verkitaĵoj de la kantistino mem, kiu gajnis per tiuj ĉi kantoj **la unuan premion** en amatora konkurso en Nederlando.

Fleksebla, nerompebla, plasta materialo

Eldonis: U.E.A. Prezo: 2,50 gld.

Aldonu 10% por sendokostoj

Mendu ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando. Poŝtkonto 378964